



BULLETIN MENSUEL

Organe de la Fédération Espérantiste Normande

ÉDITÉ PAR LE GROUPE DE ROUEN

NORMANDA STELO.



Rédaction & Administration
MM. Liébard et Leroux
41, rue de la Vicomté, Rouen

Abonnements

Un an 2 fr. (0,80 spm.),
Ce Numéro.... 0 fr. 50



Grâce à l'ardeur des **ESPERANTISTES** pour leur langue
LES ANNONCES DE "NORMANDA STELO"

sont lues aux quatre coins du Monde, cependant, leur prix est des plus modérés

1 page, une fois 20 fr.; un an 200 fr.
 1/2 page » 12 fr.; » 120 fr.

1/4 page, une fois 8 fr.; un an 80 fr.
 1/10 page, « 3 fr.; « 30 fr.

Esperantistoj kiuj al ni havigas
 5 novajn abonintojn
 ricevos
 tutjaran-senpagan abonon

Grupoj kiuj peras tutjaran
 anoncon ricevos
 monate
 10 ekzemplerojn
 de **Normanda Stele**

SAMIDEANOJ

Por praktike propagandi Esperanton, postulu ĉe via spicisto la kafojn kaj teojn de la *Havra Esperantista Komercejo*, kaj speciale ĝian markon de rostita kafo « Bona »
 Se vi petos ilin vane, informu la Generalan Agenton kaj Deponiston de la firmo.

Sinjoro A. **TERNON**, 6, rue du Repos, Paris, kiu zorgos la aferon.

Reprezentantoj havantaj klientaron estas bezonataj

Téléphone 7.66

DÉMÉNAGEMENTS

Téléphone 7.66

13^A, Route
 de Neufchatel
 ROUEN

BIENAIMÉ

Près de la Place

GARDE-MEUBLES

Beauvoisine

ÉNERGIE & LUMIÈRE

17, rue Jeanne-d'Arc

ROUEN ☺ ☺ ☺ TÉL. 14-11

ÉCLAIRAGE par tous systèmes

..... Electricité, Gaz, Essence

Lampe « **KLAROS** ». à filament métallique

FORCE MOTRICE

.... Installation. Dynamos, Moteurs

CIDRES, BOISSONS de CIDRE

fermentés, prêts à boire ou sortant du pres
 soir, pour bouillir en cave au gré du client.
 Petites et grosses provisions.....

MAISON DE CONFIANCE

BRASSERIE DES PRAIRIES ST-GERVAIS

Léon TÉNIÈRE

99, Avenue du Mont-Riboudet, ROUEN

Pension LERNEJO Londono

Por Gesinjoroj : *Hejmaj Komfortaĵoj* : Bano ; Anglaj Lecionoj
Moderaj prezoj. - Prospekto de D^r O' Connor M. A., 17, St.
 Stephen's square Bayswater, London W.

BELLE JARDINIÈRE, Mon LEGRAND, Frères

52, rue Jeanne-d'Arc, rue Grosse-Horloge, 105, ROUEN (Téléphone 5.31)

Habillements tout faits et sur mesure, tailleurs Hommes et Dames

ANNEXE : rue Jeanne-d'Arc, pour la Cravate, Cols, Bretelles, Ganterie, Parfumerie, etc.

Remise 5 % aux Espérantistes, sur présentation de leur carte ou de leur insigne

GALVANISATION ROUENNAISE

Rue de la Ferme prolongée

TÉLÉPH. 14.37

GALVANISATION A FAÇON

E. GOMICHON

PLAQUES ÉMAILLÉES EN TOUS GENRES

TÉLÉPHONE 14.37

18 et 20, Rue Lafayette — ROUEN

TÉLÉPHONE 14.37

BOLBEC. — VI^e CONGRÈS DE LA FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE NORMANDE.

Programme général de la journée du 22 juin

I. 9 h. 35. — Réception par les Samideanoj Bolbécais, à la gare de *Bolbec-Ville*, des congressistes venant de la ligne du Havre, et à 9 h. 38, à la gare de *Bolbec-Noirotot*, de ceux venant de la direction de Rouen.

II. 10 h. 15. — Réception à l'Hôtel-de-Ville par la Municipalité.

III. — Séance officielle du Congrès (Hôtel-de-Ville). *Ordre du jour* :

1. — Vérification des Pouvoirs des Délégués.
2. — Rapport de la Société Présidente siégeant à Louviers.
3. — Exposé et approbation des Comptes du Trésorier.
4. — Questions et propositions diverses.
5. — Remise des pouvoirs au Groupe de Bolbec.
6. — Election de la Société Vice-Présidente chargée de l'organisation du 7^me Congrès Normand en 1914.

IV. — Examens à l'Ecole Victor Hugo (pendant le Congrès).

V. Midi. — Banquet au Grand Hôtel de Fécamp. — Prix 5 francs.

VI. — Séance récréative : pièce théâtrale, musique, monologues, bal. — Tous les espérantistes sont cordialement invités. PITTER.

Le Havre. *Congrès du 22 juin à Bolbec.* — Pour permettre aux Membres du Groupe de se rendre au Congrès, une Excursion à prix réduit est organisée sur Bolbec pour le Dimanche 22 Juin prochain.

Rendez-vous à la gare à 8 h. précises. — Départ à 8 h. 16.

Une circulaire donnera les renseignements complémentaires.

Réunions. — A cause du Congrès, il y aura 2 réunions en juin, les Mercredis 4 et 18. Présence indispensable pour tous les Sociétaires.

Rouen. *Réunions du Groupe en Juin — Dimanche 4^{or} — Promenade à Canteleu-Montigny. Retour par la forêt de Roumare. Rendez-vous à 14 h. au bureau du tramway à Bapeaume. — Vendredis 6 et 13 — Réunions, 41, rue de la Vicomté, à 20 h. 1/2. Dispositions à prendre en vue du Congrès. Inscriptions au banquet. — Dimanche 22 — Excursion à Bolbec. Rendez-vous à la gare R-D à 8 h. — Réduction 40%.*

Rouen. *Excursion Anglaise à la suite du VI^me Congrès Espérantiste d'Eastbourne.* — Ainsi que NORMANDA STELO l'avait annoncé le Groupe Espérantiste de Rouen, véritable syndicat d'initiative, avait obtenu qu'une caravane d'Anglais viendrait visiter Rouen à la suite du Congrès Anglais. MM. Guersent, Etard, M^{me} Bloch, de Rouen, et M. Pitter, de Bolbec, qui s'étaient rendus à Eastbourne, ont fait le voyage de retour en compagnie de Gesinoroj :

Kolonelo Doktoro Pollen de Londres, Ancien Président de la British Esperantista Asocio, *Kolonelo Robinson*, Médecin militaire, Pr. du Gr. Esp. d'Eastbourne, S^{ro} *Boutwood*, Juge de Paix, Pr. du Gr. d'Hastings, S^{ro} *Adams*, Professeur de langues étrangères, Sec. du Groupe d'Hastings, S^{ro} *W. Brown*, kotonisto Del. U. E. A. de



Chorley et S^{ro} Brown, S^{ro} Pratt Del. U. E. A. de Grange-over-sands, S^{ro} Goodliffe Del. U. E. A. de Letchworth, S^{ro} Merrick (aveugle) d'Hastings, S^{ro} Wilson, S^{ino} Wilson, S^{ino} Miller de Leck, S^{ino} Collyer, de Chorley, F^{no} Willey, F^{ino} Dent de Rotherdham S^{ro} Rodgers de Doncaster, S^{ro} Gibson, de Todmorden.

Les Samideanoj sont arrivés à Rouen, le 14 Mai, à 16 heures.

Le 15 Mai, excursion à Bonsecours, visite des monuments de Rouen, photographie du Groupe au palais de justice, thé intime chez un Membre du Groupe, M. Morel, Professeur de Français, au Vert Logis, impasse des Arquebusiers. Le 16 Mai, excursion à la Bouille, retour par bateau pour permettre la visite du port de Rouen. A 20 h. 30, Lunch au Salon des Familles (33, Boulevard Beauvoisine) au cours duquel on entendit successivement les discours en Esperanto de S^{ro} Pollen, Robinson, Guersent, Leroux; puis la fête se continua par des chants, monologues, morceaux de violon, piano, violoncelle qui permirent d'applaudir successivement Sinoj Brown, Chanut, F^{ino} Magnier, le Colonel Pollen, Sroj Goodliffe, Leduc, Kuss (pianiste allemand), Cook (violoncelliste écossais).

N'oublions pas l'excellent orchestre de mandolinistes réunis par S^{ro} Delalandre d'Oissel. L'entente cordiale se poursuivit ensuite, pendant le bal, aux sons du piano tenu par M. Goupil.

Concours Michelin. — Rouen ayant été désigné comme centre d'examen pour les candidats admis à la seconde épreuve du concours, ceux-ci sont informés que cette épreuve aura lieu le *Dimanche 8 Juin*, de 14 à 17 heures, dans la salle du Groupe Esperantiste, 41, rue de la Vicomté (2^e étage). Elle consistera dans la traduction sans dictionnaire d'un texte français en Esperanto. Les candidats devront apporter : 1^o un bulletin de naissance prouvant qu'ils ont eu moins de 19 ans révolus le 1^{er} janvier 1913; 2^o du papier format commercial 24/27, une enveloppe et de quoi écrire.

La Haveno Caen kaj la Malalta Normandujo. — L'article paru sous ce titre dans "N S" du 1^{er} Mai nous a valu de nombreuses félicitations. Ajoutons que ce court exposé est le résumé d'une remarquable étude faite par M. Hérubel, 112, rue Monge, à Paris, qui se fera un réel plaisir de renseigner sur le port de Caen tous ceux qui voudront bien lui écrire. Les bureaux de la Ligue Maritime sont maintenant transférés à Paris, 8, rue la Boétie.

Propagande. — A signaler un très intéressant article relatif à la *Valeur pédagogique de l'Esperanto dans l'enseignement primaire* paru, sous la signature de M. Cayeux, Instituteur à Rouen, dans le *Bulletin Mensuel de l'Association Amicale des Anciens Elèves de l'Ecole Normale d'Instituteurs de la Seine-Inférieure*.

Ba.

HAVRE - GVIDLIBRETO

Antaŭ ol gvidi vin tra nia urbo, mi diros al vi kelkajn vortojn pri ĝia historio.

Ĉe la malsupro suda de l'promontoro "*La Hève*" staris, antaŭ kelkaj jarcentoj, kapelo dediĉita al *Notre-Dame-de-Grâce*, cirkaŭita de kelkaj dometoj de malriĉaj fiŝkaptistoj. Apude, ĝis *Harfleur*, etendiĝis marĉoj malkovritaj de la maro dum la malfluso. Tie la reĝo *François 1^{er}* donis ordonon al admiralino *Bonnivet*, en la jaro 1517, krei havenon por anstataŭi *Harfleur*, kies haveno estis plenigita je sablo kiu, iom post iom, plenigas la enfluejon de la riverego *Seine*. La sekvan jarcenton, la kardinalo *Richelieu* konstruigis remparojn kaj pordegon nomitajn el lia nomo, pli profundigis la basenon kaj fermis ĝin per kluso. La ministro *Colbert* daŭrigis la laborojn de siaj antaŭuloj kaj sen halte *Le Havre*, ĉiam pli kaj pli, graviĝis, tiele ke, en la jaro 1787 oni decidis forpuŝi la remparojn kvar cent metrojn pli malproksimen kaj fosi du basenojn. En la jaro 1832 oni aneksis la ĉirkaŭantajn komunumojn kaj detruis la senutilajn remparojn.

Nun *Le Havre* kalkulas 136.159 loĝantojn kaj ĝia plivastiĝo, sen halte, kreskas.

Por pli da oportuneco ni komencos nian promenadon ĉe la urbdomo. Se oni havas malmulte da tempo oni povos uzi la tramon, sed estas preferinde iri piede.

La Urbdomo (*L'Hôtel-de-Ville*)

Estas bela monumento, konstruita dum la jaroj 1835-1859, laŭ la renesenca stilo. La gardaturo kiu superas ĝin estas alta je 42 metroj. Belegan vidaĵon oni ĝuas ĉe la belvidejo de tiu gardaturo kien oni povas supreniri kun la permeso de l'pordisto.


Elirinte el la ĝardeno de la urbdomo vi trairu la publikan ĝardenon kiu kuŝas kontraŭ ĝi kaj, ĝuste antaŭ vi, estas.

Strato de Parizo (*La rue de Paris*)


Kiu kondukas al la havendigo (*Jetée*) traŭrante la *Place Gambetta*, funde de kiu, dekstre, staras la Teatro, kiu post bruligo, en la jaro 1844 estas rekonstruita de *Charpentier* arkitekturo de l'komika opero de Parizo. Maldekstre, antaŭ la komerca baseno (*Bassin du Commerce*), meze de ĝardenetoj, staras la statuoj de *Bernardin de Saint-Pierre* kaj de *Casimir Delavigne*, ambaŭ verkoj de *David d'Angers*.

Malantaŭ la teatro oni ekvidas la nutrajvendejon (*Halles Centrales*) kaj poste la teatron (*Folies-Bergères*).


Daŭrigante nian paŝadon, ni renkontos la "*Place Richelieu*". Sur tiu-ĉi loko, antaŭ 1791 staris la pordo de *Ingouville* (*porte d'Ingou-*



Urbdomo



Komerca ĉambro



Borso

ville) rimarkinda specimeno de milita arĥitekturo dum la regno de *Louis XIII*. Ĝi estis la norda lino de la urbo; ĝia beleco kaj eleganteco ne savis ĝin de la detruemeco de la inĝenieroj.

La parto de la strato kiun ni vidas poste apartenas al la malnova urbo. Super belaj modernaj magazenoj oni ekvidas malnovajn kaj ofte nebelajn konstruaĵojn aspektigante malbele tiun-ĉi parton de la kvartalo, kvankam ĝi estas la plej uzata de la gehavranoj pro ĝiaj elegantaj magazenoj. Poste, ni alvenas al placo de l' malnova vendejo (*Place du Vieux-Marché*) ornamita per statuo de *Augustin Normand*, havra ŝipkonstruisto, statuo kies la verkisto estas la skulptisto *Bénet*.

Funde de la placo staras la natursciencan muzeon (*muzéum*) kiu posedas ŝatindajn kolektojn pri natura historio, prahistorio kaj etnologio. Senpaga eniro ĉiujn dimanĉojn.

Tiu-ĉi placo estas la plej malnova de Havro, tion montras ĝia nomo. Ĉe la nord-okcidenta angulo *Arago* konstruis sunhorloĝon kiu montras la meridianon de la loko.

Apude, ni rimarkos la plej belan preĝejon de la urbo (*Notre-Dame*) dediĉita al la Sankta Virgulino, konstruita, parte, dum la jaroj 1574-1638 laŭ la planoj de *Nicolas Duchemin*; ĝi estas finita nur en 1827.

La fasado montras du stilojn. Supre, korintiajn kolonojn, malsupre, ioniajn kolonojn kun ringoj laŭ la jezuita stilo. La pordego de la norda flanko estas supre ornamita per gotikaj literoj. La sonorigejo, kvadrata turo, ĉe la suda flanko, estas pli malnova ol la preĝejo, ĉar oni konstruis ĝin en la jaro 1540 laŭ la ogiva stilo. Interne, oni rimarkas belan orgenon ornamitan per blazono de kardinalo *Richelieu*, katedron de la XVIII^a jarcento kaj belajn bildvitralojn.

La suda ekstremo de la strato de Parizo kuniĝas kun


Granda Kajo (*Grand Quai*)

Kie staras la muzeo de belartoj kaj arkeologio, konstruita dum la jaroj 1842-1844 laŭ la planoj de *Brunet-Debaisnes* je la neogreka stilo. Ĝia fasado estas ornamita supre per statuoj (Pentrarto, Skulptarto, Historio kaj Scienco). Ĝi enhavas multe da ŝatindaj pentraĵoj, statuoj kaj arkeologiaĵoj, kolektaroj vizitindaj de belartamantoj.

La pasilegoj videblaj en la korto estas trovitaj funde de la maro en ŝipo antaŭe subakvigita.

Tiu-ĉi angulo de la granda kajo estas nomata golfejo de l' pilotoj (*Anse des Pilotes*) loko kie estas alligataj plej ofte la fiŝkaptistaj boatoj; precipe dum januaro kaj februaro pro la haringkaptado, ĝi montras grandan aktivecon.

Tre bedaŭrinde oni malkonstruis la "*Tour François I^{er}*", turan



Baseno de la Komercio



Magazenoj por Kafo



Muzeo de Belaj artoj

fortikajon starigitan sur tiu-ĉi loko en la XVI^a jarcento kaj malkonstruitan dum la jaroj 1860/61 por pli grandigi la enirejon al la haveno.

Tie-ĉi komencas la havendigo (*Jetée*), preferata promenejo de la havranoj kaj de l' vizitantoj. Tie-ĉi oni estas tre bone lokata por rigardadi la eniron kaj la eliron de ĉiuspecaj ŝipoj kiuj vizitas nian havenon. Apude, staras semaforo, antaŭ ne longe konstruita monumenteto. Per signaliloj metataj sur masto starigita meze de l'tegmento, oni montras al la maristoj en la rodo, la altecon de la akvo en la havenenirejo. Flagoj montras la fluson kaj la malfluson.

Reveninte al la (*Anse des Pilotes*), ni preteriras la kajojn kie estas la enŝipejoj de la vaporŝipoj velurantaj al *Honfleur*, *Trouville*, *Caen* kaj *Southampton*. Ĉe la angulo de la « *Grand Quai* », kaj de la « *Rue Notre-Dame* » staras la limimpostejo (*Grande Douane*) konstruita dum la jaro 1758.

Daŭrigante per la « *Quai Notre-Dame* » kaj la « *Quai Videcoq* » ni alvenas antaŭ arsenalo (*l'Arsenal*), loĝejo de la ĝenerala ĉefestro de la maristaro. Ĝi estas konstruita dum la jaroj 1779/80. Oni rimarkas kverkajn pordegojn bele skulptitajn kaj sur la tegmento rostraĵojn kaj sonoriltureton formitan el kolonetaro elegante ordigita ronde. Tie ĉi, sur la antaŭa placo, oni konstruis militŝipojn ĝis 1812. Sude de la placo estas malnova baseno (*Vieux Bassin*) ankaŭ nomata baseno de l'reĝo (*Bassin du Roi*), tiel nomita ĉar ĝi estas la plej malnova baseno de Havro.

Trairu la ponton apude kaj vi estas en la



Kvartalo *Saint-François*

vizitinda pro la varieco de ĝiaj loĝantoj. Efektive, tie oni renkontas specimenojn de multnombraj rasoj nome : anglojn, germanojn, japanojn, ĥinojn, ktp., preskaŭ ĉiujn maristojn de la terglobo. Rimarku domojn konstruitajn dum la XVIII^a jarcento por riĉaj negocistoj, kiuj loĝis tie ĝis la malkonstruo de la remparoj, malkonstruo kiu ebligis la pligrandigon de la urbo.

Tie ĉi vizitu la preĝejon *St-François*, komencitan dum la regno de Henri II sed finitan nur dum 1841, samtempe kiam oni konstruis la antaŭpordegon.

Apude staras la tabakfabrikejon (*Manufacture des Tabacs*) konstruitan en 1729 sur la loko okupita de monaĥejo por kapucenoj, tarigita en 1590.

Ni forlasu *St-François*, trairinte ponton (*Alexandre III*), ni alvenas « *Place Jules Ferry* » malantaŭ la palaco de la borso (*Palais de la Bourse*) moderna grava konstruaĵo kie la negocistoj kunvenas por komercaj aferoj. Dekstre staras la tabakprovizejo, nebela konstruaĵo kiun baldaŭ anstataŭos centra poŝtoficejo. Ĉe la alia fasado



Pregejo « Nia Sinjorino »

de la borso estas la " *Place Carnot* ", kaj la subprefektodomo (*Sous-Préfecture*) sensignifa monumento laŭ stilo *Louis XIII*. Iom pli malproksime estas la juĝejo, kontraŭe de kiu staras la soldatejoj " *Eblé* " kaj " *Kléber* ",


Ni turnu al okcidento sur la bulvarado, kaj reveninte al la borso ni pasos antaŭ la poŝtoŝicejo kaj alvenos al la urbdomo. Ni daŭrigu, sekvante bulvardon de " *Strasbourg* " kaj, dekstre ni rimarku la ŝparkason (*Caisse d'Epargne*) poste la " *Jardin St-Roch* " kiu kuŝas sur ekstombejo, kelkaj statuoj ornamas ĝin kaj en ĝia mezo estas lageto kie majeste naĝas cignoj kaj anasoj. Ĉiam sekvante la bulvardon ni alvenas al la maro antaŭ la digoj kiuj protektas la havenon. La norda digo estas longa je 400 metroj kaj la suda 800 m. Ĉe ilia ekstremo staras lumturo kaj fortikaĵo. Laŭ longe de la marbordo preteriras la " *Boulevard Maritime* " kondukanta al la " *Nice havrais* " kaj al " *Ste-Adresse* ", ŝatindaj promenejoj. Tramo veturos ĝis la lumturoj de la promontoro " *La Hève* ".

Meze de la " *Boulevard Maritime* ", sin montras la " *Casino Marie Christine* " eleganta konstruaĵo nove restarigita sur la loko jam okupita de la malnova, kaj ĝi altiras nian atenton (enirpagon 1 fr.). Antaŭ ĝi estas mara banejo ĉirkaŭita, somere, de lignaj dometoj kie familioj ĝuas la malvarmeton dank'al la mara venteto. Oni povas daŭrigi la promenadon ĝis " *Ste-Adresse* " pri kiu ni parolas pli detale ĉe la fino de tiu-ĉi libreto.

La dua parto de nia promonado okazos en la doko, magazenegoj, ŝipegoj k. t. p. Por ne tro laciĝi ni uzos tramon kiu kondukas al " *Boulevard Amiral Mouchez* ".

Ni foriru el " *Place Gambetta* " apud la loko difinita al la jaĥtoj en la baseno " *du Commerce* " laŭ longe de kiu kuras la tramo, pasante maldekstre, antaŭ la mortintejo (*Morgue*) kaj ni alvenas al la baseno de " *l'Eure* ". Ni forlasu la tramon por viziti transatlantikan ŝipegon (enirpago 0 fr. 50, bileto aĉetebla ĉe la kajo en la enŝipejo). Post tiu neevitebla kaj rekomendinda vizito ni trapasos antaŭ la " *Docks* " vastegaj magazenegoj kie la negocistoj metas siajn tutspecajn komercaĵojn atendante la liveron al la aĉetontoj. Apude estas la " *Cales sèches* ", specialaj basenetoj facile malplenigeblaj per pumpiloj kie oni riparas la ŝipojn. Ni estas en la kvartalo de " *l'Eure* " kies preĝejo, sensignifa moderna konstruaĵo, estas dediĉita al Sankta Nikolao.

Tiu-ĉi kvartalo estas centro de laboro. Ĉie, oni renkontas plej gravajn meĥanikajn fabrikejojn. Tie-ĉi la plej potencaj markompanioj alfordigas siajn ŝiparojn. Sub specialaj vastegaj magazenoj



Muzeo de Naturaj sciencoj

oni elŝipigas kotonajn ŝipsarĝojn, kalkuleblajn laŭ milionoj da pakegoj ĉiun vintron.

Sur la marbordo, ŝipkonstruejo, buĉejo kaj brulejo de balaĵoj estas vizitindaj.

Tramo rekondukas vin ĉe la centra urbo.

La tria parto kondukos nin sur la " Côte " monteto kiu superas la urbon ĉe la norda flanko. Se vi timas supreniri piede, proksimume 90 metrojn, vi povos uzi tramon aŭ ŝnurfervojon (enirejo " *Place Thiers*, 0 fr. 10) kiu veturos vin ĝis la supro. Tie vi ĝuos la plej ŝatindan vidaĵon al la urbo etendiĝanta sub viaj piedoj. Trans la maro la montetoj de " *Calvados* " vidiĝas kun ĉe ilia malsupro " *Trouville* ", " *Honfleur* " kaj la enfluejo de la *Seine*.

Daŭrigante la straton " *de l'Abbaye* " kiu pasas antaŭ la fortikaĵo de " *Tourneville* " kaj la tombejo de Havro, ni alvenos al " *Abbaye de Graville-Ste-Honorine* ", rimarkinda romanida konstruaĵo de l'XI^a jarcento, ĉirkaŭita de pentrinda tombejo kie oni vidas antikvan ŝtonan krucon.. Ĉe la suda flanko estas teraso el kie oni ĝuas belan vidaĵon. Eksmonaĵo estas tuŝanta la preĝejon sed ĝi estas pli moderna. La tutaj aspektoj ŝatinde. Ne foriru sen apuda vizito ĉe la nigra sankta virgulino (*Vierge Noire*) starigita, dank' al monaĥo post la milito 1870/71, alta je ses metroj, ĝi estas pilgrimejo.


SAINTE - ADRESSE

Sainte-Adresse kuŝas ĉe la nord-okcidenta ekstremo de Havro, meze de ĉarma valetio ombrata de altaj arboj. Ĝiaj domoj kun iliaj ĝardenoj grupiĝas en bela ordo sur la deklivoj de l'montetoj kiuj ĉirkaŭas ĝin. Granda parto da ili estas loĝejo de riĉetaj aŭ ĉe de riĉaj negocistoj, zorgantaj pri siaj domoj ofte ĉirkaŭataj de parketo. Pro tio la tuta vidaĵo montras la plej ĉarman aspekton, precipe sur la monteto kiu superas, norde, la valetion kies suda ekstremo estas barata de l'mara horizonto.

Meze de la arboj staras la pinto de la sonorilejo de la preĝejo, nova konstruaĵo laŭ la ogiva stilo de la XIII^a j. Ĝi anstataŭas malnovan preĝejon konstruitan proksimume en 1373 kaj nun malkonstruitan.

Sur la marbordo, je la ekstremo de " *Boulevard Maritime* " kruta vojeto supreniras al monumenteto nomata sukerkonuso (*Pain de Sucre*). Ĝi memorigas morton de sinjoro *Lefebvre-Desnouette* mortinta per ŝippereo sur la marbordo de Irlando en 1822 kaj ĝi estas starigita de lia vidvino.

Longatempe ĝi montris la havenon al la maristoj.



Entree de la Museo de Naturaj sciencoj

Iom pli alte estas kapelo Nia sinjorino de l'ondoj (*Notre Dame des Flots*). Konstruita en 1859 el ŝtonoj deprenitaj el fortikaĵo de Havro ĝi enhavas multajn dankajn memoraĵojn, murpentraĵojn kaj flagon devenintan el Tapiŝejo de "*Beauvais*" en la XVII^a jarcento.

Proksime de la vojeto oni renkontas vojon kondukantan al la lumturoj kiuj staras sur la marbordo en loko sidanta 101 metrojn super la maro. Ilia prapatro, se oni povas tiel diri, estis flamo brulanta sur la supro de turo dum la regno de *Jean le Bon*, duko de Normandujo; papero datumita de la jaro 1349 tion pravas. Post longa ĉesado oni reekbruligis ĝin la 1^{an} de novembro 1775. La lumon oni ricevis el karbonfajro, sed en la jaro 1778 oni anstataŭis tiun antikvan rimedon per oleaj lampoj, kiujn oni perfektigis poste kaj en la jaro 1865 elektra lumo estis definitive uzata.

Ili estas konstruitaj de la Komerca Ĉambro. La norda lumturo estas elektra kaj eklipsa, havanta lumon de 2.500.000 lampoj "*Carcel*" videblan je 90 kilometroj. La suda lumturo estas oleo lumigata kaj servas nur por korekti la vojon de la ŝipoj alvenantaj. Ĝi estas vizitebla, sed oni bezonas permeson por viziti la nordan. Iom pli norde kuŝas la fortikaĵo "*Dollemard*". Apud la lumturoj staras farmoj ĉirkaŭataj de belaj arboj meze de kiuj estas vojeto ombrata tre agrable dum la varmoj de l'somero kaj kondukanta al la tombejo proksime de kiu staras monumenteto nomata solejo (*Solitude*), eleganta sed tute ruinigita, ĝi estas, bedaŭrinde, enŝloŝita meze de malbelaj konstruaĵoj kiuj perdis al ĝi ĝian antikvan aspekton. Ĝi estis antaŭe rendevuejo de ĉasistoj. Apude oni vidas kasteleton kie loĝis, dum kelkaj jaroj, la fama aktorino "*Sarah Bernhardt*".


Reveninte al la "*Solitude*" turnu maldekstre kaj la strato kondukos vin al "*Manoir de Vivantal*" kie loĝis "*Charles IX*" kaj "*Catherine de Médicis*" dum la repreno de Havro el la Angloj, dum la jaro 1563. La sesangula turo kovrita per hedero estas moderna, kiel la norda flanko, kvankam la tutaĵo aspektas antikve.

La stratoj "*du Manoir*" kaj "*Ch. Dalencourt*" rekondukas vin al la maro trapasante antaŭ la preĝejo kaj la urbdomo. Reveninte al "*Boulevard Maritime*", vizitu la "*Vice Havrais*" kie staras la palaco de ŝipkurado (*Palais des Régates*) ĉirkaŭita de domaro kaj konstruaĵoj laŭ moderna stilo.


La tramo supreniras ĝis la lumturoj, dum somero, kaj revenas Havron tra *Ste Adresse* ĉe la kontraŭa flanko.

HARFLEUR kaj MONTIVILLIERS

Tramo aŭ fervojo veturos vin al tiuj malnovaj urbeloj, ili estas



Arsenalo



Urba Kasino

vizitindaj, ne nur pro la plezuro de ĉarma irado tra bela valo kiu montras pentrindajn vidpunktojn, sed ankoraŭ ĉar ili enhavas ambaŭ verajn arhitekturajn juvelojn, nome : iliajn preĝejojn. Harfleur, kiun la scienculoj opinias esti "*Caratolinum*" de la roma epoko, sidas sur la rivero *Lézarde* apud ĝia enfluejo. Dum la mezepoko ĝi ricevis ŝipojn alvenantajn el Hispanujo, Italujo k. t. p. sed, iom post iom, la sabloj plenigis la havenon malhelpante la alboriĝon de l' ŝipoj. Tiam ĝi estas forlasita kaj la urbo malgraviĝis.

En la jaro 1415 la Angloj kaptis ĝin kaj tie restadis dum 30 jaroj. La historio rakontas ke ian tagon 104 Harfleuranoj kondukita de "*Le Carnier*" kaj *Gronchy* forpelis la fremdulojn kaj rekaptis sian urbon. Dum la XVI^a jarcento oni rekonstruis la preĝejon kies eleganta ŝtona sonorilejo rebrilas pentrinde en la akvoj de l' rivero. La norda pordo, laŭ la ogiva stilo, estas ornamita per ĉarmaj skulptaĵoj, bedaŭrinde eluzitaj de la tempo.

Ĉe la suda flanko de la urbo oni vidas ankoraŭ dikajn fortikaĵojn tute ruinigitajn, kelkaj malnovaj domoj estas ankoraŭ videblaj apud la preĝejo. Somere, sur la rivero kaj la kanalo "*de Tancarville*" okazas kuradoj de remboatoj. Trans la kanalo oni ekvidas la fabrikejon de pafilegoj de la grava firmo *Schneider* kiu apude, konstruis domaron por ĝiaj laboristoj.

Revenu al la tramo kiu veturos vin al "*Montivilliers*" kies nomo (*Moustiers Villiers*) devenas de grava monakinejo kiu, longatempe, regis la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn. Ĉe la angulo de la ĉefa placo, kontraŭ la urbdomo nove konstruita, staras la preĝejo. Ĝia ŝtona pinta turo bele staras de post la XII^a jarcento; apude, la sonorilejo, romanida kvadrata turo, konstruita super la transepto je la sama epoko. Dum la XVI^a oni rearanĝis la nordan flankon laŭ la ogiva stilo, konstruante novajn kapelojn kies enirejo ĉe la nordokcidenta angulo, sub arkaĵo, estas bele ornamita per skulptaĵoj.

Ĉe la tombejo vizitu la kadavroputrejon (1582-1602) kaj la ŝtonan krucon skulpitan en la jaro 1589 kaj nove riparitan.


Vizitinda ankaŭ estas la foirejo, ĉirkaŭita de jarcentaj arboj, ĝia suda flanko montras remparojn tute ruinigitajn.

Raoul Lefaix.





HARFLEUR



MONTIVILLIERS

BOLBEC (Bolbek)

HISTORIO. — *Bolbec* estas beleta urbeto konstruita flanke de monteto, malsupre de kiu fluas la *Bolbec* en haveneto mallarga, ĉe la kuniĝo de kvar valoj. Ĝiaj stratoj borderitaj per ĝardenoj, ĝiaj fontanoj, ĝiaj vivaj fabrikejoj kaj la kamparaj domoj de la valo donas al tiu-ĉi lando specialan aspekton.

La teritorio *Bolbec* estis konata kaj vizitata de la Romanoj, ĉar la vojo de *Lillebonne* al *Etretat* kaj *Fécamp* ĝin trairis.

Iam, tiu teritorio dependis de la graflando de *Eu*, juĝejo de *Caudebec*, intendantejo de *Rouen*, parlamento de *Normandie*. La urbo *Bolbec* (11 080 loĝantoj) nun kantona ĉefurbo de la distrikto de *Havre (Seine-Inférieure)*, kusas je 176 kilometroj de *Paris*, 58 k. de *Rouen*, 28 k. de *Etretat*, 25 k. de *Fécamp*, kaj 8 k. de *Lillebonne*.

La komuniĝo kun *Bolbec* fariĝas per ŝtata fervojo (de *Paris* al *Havre*); per la stacio *Bolbec-Nointot*; je 3 kilom. de la urbo, kaj per la fervojo *Beuzeville-Bréauté* al *Lillebonne*, stacio *Bolbec-Ville*.

La nacia vojo de *Paris* al *Havre* trairas la urbon *Bolbec* kie ĝi nomiĝas: vojo de *Rouen*, strato *Guillet*, strato de la *République*, strato *Léon Gambetta*, strato kaj vojo de *Havre*.

La rivero *Bolbec* aŭ *Bec* estas formita per fortaj fontoj ŝprucantaj almonte de *Bolbec*. Ĝi formiĝas apud la malnova kastelo *Fontaine-Martel*; ĝi donas la movan forton por la ŝpinejoj, teksejoj, muelejoj, kaj por la aliaj industrioj troviĝantaj en tiu-ĉi urbo. La rivero *Bolbec* post kiam ĝi trairis *Lillebonne* kie ĝi estas nomata: rivero de la komerco, fluas en la *Seine* kontraŭ *Quillebeuf (Eure)* ne malproksime de la kastelo de la sinjoroj de *Tancarville*.

Populara tradicio, religie konservata en *Bolbec*, certigas ke dum ia epoko de la historio de tiu-ĉi urbo, la posedantoj de la kastelo *Fontaine-Martel* (lokata apud la fontoj de *Bolbec*) kaj la posedantoj de la kastelo *Calletot* (kuŝanta sur la vojo de *Rouen*) intermilitis. Oni ankaŭ diras ke dum la militado *Fronde* la du kastelmastroj reciproke furioze interbatalis.

Hodiaŭ la kastelo *Fontaine-Martel* estas nur ruinoj sen ia karaktero, kvazaŭ forlasita de sia posedanto, de la ekskursanoj kaj de la loĝantoj de *Bolbec* kies plimulto malscias la gravan partoprenon de tiu-ĉi kastelo dum la antaŭa epoko.


La muroj kuĵ ĝin ĉirkaŭas ŝajnas konstruitaj dum la romana epoko.

Kelkaj postsignoj de la kastelo *Calletot* ekzistas en la du farmbienoĵ nomataj: farmdomo de la *Tourelles de Calletot*, kaj farmdomo de la *Colombier*.

La malnova priorejo *Val-aux-Grès* aŭ *Val-aux-Malades*. estis leprulejo de la dekdua jarcento, kiu estas rekonstruita dum la deksepa kaj en 1875. Hodiaŭ, ĝi estas privata domo konservinta sian monaĥejan karakteron. La kapelo plu ne ekzistas.

La urbo *Bolbec* je kvar intersekvaj fojoj (1583-1676-1696 kaj 1765) estis pro bruladoj preskaŭ tute detruita. En la monato junio 1897, du superakvoj la urbon ruinigis kaj kaŭzis grandegajn difektaĵojn.

MONUMENTOJ. — La urbo *Bolbec* enhavas kelkajn monumentojn indajn por altiri la atenton de la turistoj.



Bolbec. — Komerca Ĉambro



En Normandujo - Rikolto de pomoj.

LA URBDOMO, remarkinda pro la salono de la konsilantaro, staras meze de publika ĝardeno en kiu estas du fontanoj ornamitaj per, el blanka marmoro, tre belaj statuoj elvenantaj el *Marly* : unu montras Diane ĉasistinon ; la alia, la Artojn relevatajn de la Tempo.

LA KATOLIKA PREĜEJO kiu nomiĝas *Saint Michel* estas konstruita en 1775, laŭ la planoj de la Arkitekturo *Pallet* ; ĝi formas latinan krucon. Ankoraŭ oni devas signali la amplekson de ĝia perono.

LA EVANGELIA TEMPLO, la una kiu estas fondita en la *Seine-Inférieure*.

LA KOMERCA ĈAMBRŬ belega domo, donita de ĝia Prezidanto sinjoro *Georges Lemaître* manufakturisto.

LA STRATO DE LA RESPUBLIKO kiu komencas sur la placo apud poŝto-ficejo estas la ĉefa de la urbo ; je la numero 12 staras bela domo de l'epoko Ludoviko XV^a. Tiu-ĉi strato kondukas al la urbdomo kaj al la ĝardeno. *Bolbec* posedas kuriozajn stratetojn ŝtupare. Estas ankoraŭ kelkaj bustoj el bronzo memorigantaj tieajn glorulojn, nome :

Busto de generalo *Ruffin* (1771-1811). Li sin enskribigis kiel volontulo en 1792 kaj batale atingis ĉiujn rangojn Li estas mortvundita je la sieĝo de *Cadix*.

Busto de *Jacques Fauquet* (1785-1854) urbestro kaj ĝenerala konsilanto donis por la urbo *Bolbec* : hospitalon kaj rentamir por zorgi ĝin : plie, li donis la publikan bibliotekon ; unu dependejon de la urbdomo, la teatron kaj la domojn ĝin tuŝantajn.

Busto de *Léon Desgenétais* (1854-1893), distrikta konsilanto, deputato kaj donacanto de la haba lernejo kiu havas lian nomon.


KOMERCO kaj INDUSTRIO. — La urbo *Bolbec* estas la centro de la manufakturoj la plej gravaj de la lando de *Caux*. Antikve, *Bolbec* havis kiel havenon *Lillebonne*.


La pejzaĝo ja estas ĉarma pro la valo kiu komencas ĉe la bordo de la *Seine*. kaj kies *Bolbec* estas la supro ; tial la industrio estas altirita al ĝi.

La kotona industrio kiu ekzistas de *François 1^{er}* kolektas kotonojn sendatajn de la haveno *Le Havre*, ŝpinas kaj aliformigas ilin je krudaj kotonaĵoj kaj katunoj kiuj estos ekspedataj al *Rouen*, granda vendejo por toloj.

Oni devas citi la ŝpinejojn kaj la mekanikajn teksejojn de Sroj fratoj *Desgenétais*, de Sro *A. Fauquet-Lemaître* kaj de Sroj *A. Manchon-Lemaître et Cie* ; la katunejojn de la *Vosges* kaj de *Normandie* ; la tubejojn de Sro *Louis Debray* kun ĝiaj multaj kaj komfortaj domoj por laboristoj.

G.-F. Mauconduit.





CORDONNERIE DU PALAIS
Chaussures de Luxe et de Travail

V^{re} A. HERMEL

1, Rue Rollon, 1 -:- ROUEN

ESCOMPTE 5 % AUX ESPÉRANTISTES

FOURNITURES GÉNÉRALES POUR CAVES

MACHINES A RINGER ET BOUCHER LES BOUTEILLES
PORTE-BOUTEILLES ET ÉGOUTTOIRS

Porte-fûts, robinets, cire, capsules, etc.

Maison DUVAL Frères

V^{re} G. DUVAL et H. SCHOFFER, Suc^{re}

18, rue Alsace-Lorraine, ROUEN. - Tél. 9.54.

Ateliers de Fabrication et de Réparation

55, 57, rue des Augustins

A cette adresse : Magasin de vente d'Articles de Laiterie

A LA NOUVELLE MAISON
Anciennement **A LA MAISON D'OR**
54, Rue d'Amiens, 54

A. GORAT

196, 198, 245, Rue Eau-de-Robec - ROUEN

Matelas, couvertures, tapis, vente et achat de mobiliers

MEUBLES Neufs et d'Occasion

AMEUBLEMENTS EN TOUS GENRES

Maison de confiance. — Ne pas confondre

Bien s'adresser à la « NOUVELLE MAISON »

**MACHINES A BRIQUES
ET CALIBREUSES**

Maison C. LAPIERRE

Henri CATHERINE, Successeur

39, rue du Faubourg-Martainville

près le Champ-de-Mars

— < **ROUEN** > —

Grands Magasins DU LINGOT D'OR

60, 62, 64, rue du Bac et rue des Fourchettes, ROUEN

Nouveautés, Ameublements en tous genres, Confections pour hommes et jeunes gens, pour dames, fillettes et enfants, Chaussures, Chapellerie, Lingerie, Bonneterie et Parapluies. Articles de Chauffage et d'Eclairage, Faïence et Porcelaines, Horlogerie, Bijouterie et Glaces.

Capital 100 millions **CRÉDIT DU NORD** 25 millions versés

SIÈGE SOCIAL A LILLE

SUCCURSALE DE ROUEN, 68, rue Jeanne-d'Arc (en face la Poste)

Escompte et Banque. — Achats et Ventes de titres. — Paiements de tous Coupons. — Location de Coffres-forts avec tarif décroissant suivant durée et dimensions. — Garde de Titres.



LE GUIDE ILLUSTRÉ DE ROUEN EN ESPERANTO

0 fr. 60, chez Blondel, rue Cauchoise, 21, Rouen

a sa place marquée dans la bibliothèque de tout homme de goût en Normandie, et dans la poche de tout touriste avisé



19, QUAI DU HAVRE, ROUEN — TÉLÉPH. 1204
E. W. SYLVESTER FILS
 REMISE 5 0/0 AUX ESPÉRANTISTES
 HUILES D'OLIVES D'ITALIE, PROVENCE, ALGÉRIE, ESPAGNE

GRANDE BRASSERIE NATIONALE

33, Rue de la République, ROUEN

Téléph. 950 RESTAURANT A TOUTE HEURE Téléph. 950

Maison Fuhr LHIRONDEL et KUBIK S^{rs}

51, 53, rue Grand-Pont, ROUEN

ORTHOPÉDIE, BANDAGES, INSTRUMENTS DE CHIRURGIE

Spécialité de Corsets de Toilette pour Dames et Fillettes

GRAND HOTEL BARETTE

Téléphone 2068

JOURNÉE POUR VOYAGEURS

A 6.50 & 7

ÉCLAIRAGE ÉLECTRIQUE

Garçon de Courses

Salons pour Noces et Banquets - On reçoit Touristes en Groupes

ANCIEN M^{ON} LELOUP

35 et 37, Place Carnot (en face la gare d'Orléans) ROUEN

GRANDA HOTELO DE L'GLOBO

LA GEMASTROJ

PARIS — 71, strato Monge

ESTAS ESPERANTISTOJ

Ĉambroj de 2 ĝis 5 frankoj tage

ELEKTRA LUMO

HEJMA TELEFONO

POMPES FUNÈBRES

Les familles ont intérêt à éviter les intermédiaires, souvent très onéreux, elles peuvent s'éviter sans frais supplémentaires toutes démarches en s'adressant elles-mêmes au Service municipal des pompes funèbres, ou en faisant appeler à leur domicile un employé de ce service. S'adresser

102, rue de la République, Rouen, et 39, rue Benoist, St-Sever. Tél. 187



MAISON
THE HIGH LIFE
TAILLEUR

VOUS SEREZ BIEN
HABILLÉ

6 RUE GRAND PONT
ROUEN

PRIX MODÉRÉS



MAISON SPÉCIALE

LINOLÉUM UNI

et Imprimé

Linoléum Incrusté

LEDRU & C^{ie}

19, Rue de la République
 (Coin de la Rue St. Denis)

ROUEN

Papiers Peints

Toiles Cirées

Tapis — Carpettes

Moquettes

CHARBONS

et

BOULETS

pour

foyers domestiques

22, rue Jeanne-d'Arc, ROUEN, Téléph. 20.08

A. Lemoine & ses Fils

seuls fabricants des

BOULETS OVOÏDES LEMOINE

BRIQUETTES

pour

générateurs

Marque A. L.

Garage Robert CATOIS

ROUEN

Rue du Donjon (Tour Jeanne-Darc)

TÉLÉPHONE 1317

Agence **BERLIET**

Pneus **MICHELIN**

L'ÉGLANTINE

82, Rue Jeanne-Darc, ROUEN

COURONNES en tous genres

Fleurs artificielles

PLANTES D'APPARTEMENT

TÉLÉPHONE 472

CHEMISIER

COLOMBE, 62, Rue Jeanne-d'Arc, ROUEN

COUPE & QUALITÉ GARANTIES

Grand choix de Tissus haute nouveauté

CHEMISES SANS BOUTONS

CHEMISETTES SUR MESURE, façon chemisier

Envoi du catalogue sur demande

TÉLÉPHONE 12.60

AUX AUTOMOBILISTES !

USINE DE RÉPARATIONS DE PNEUMATIQUES DU CHAMP-DE-MARS

OUTILLAGE PERFECTIONNÉ 9, Boulevard Gambetta, 9 Téléphone 15.20

Usine à vapeur, électrique et hydraulique. Réparations défiant la concurrence d'enveloppes éclatées et chambres à air

Réchapages anti et lisses. — Achat de déchets "Chambres à air"

TROUSSEAUX & LAYETTES

Spécialité de Toiles

Lingerie fine . . .

Linge de Table . . .

Mouchoirs

M^{on} Lucas-Leclin

CH. LUCAS, SUCC^r

44, rue du Change - 12, rue Grand-Pont. — ROUEN

VESTAJOJ POR VIROJ, JUNULOJ KAJ KNABOJ

THIERY kaj MARTIN 32, 34, 36, Rue de la République
— ROUEN —

—: DRAPOJ, VESTOJ, ĈAPOJ, ĈEMIZOJ :—

APPRENEZ L'ESPERANTO

Les Gérants: **LIÉBARD, LEROUX.**

Imprimerie **BLONDEL**, 21, rue Cauchoise à Rouen.